

27a jarkolekto - februaro 2006/2

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijs - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

KATALUNIO:

**Survoje al pli granda
memregado**

JAPANIO:

Februaraj festoj

MANKSO:

Reviviĝo de mortinta lingvo



Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Survoje al pli granda memregado 10

La 30an de septembro la kataluna parlamento voĉdonis por nova statuto de aŭtonomio. Temas pri leĝo, difinanta la rilatojn kaj distribuon de respondecokoj inter la centra hispana kaj la aŭtonoma kataluna registaroj, kiu devus aktualigi la nun ekzistantan, aprobitan en 1979.



18 Februaraĵoj festoj



La 11a de februaro estas la tago de la fondiĝo de Japanio. Sed malmultaj ekster Japanio scias, kiel oni festas la tagon, kaj kial.

14

500 ĉefverkoj en Monako



La ekspoziciejo Grimaldi Forum el Monako prezentis „unikan vojaĝon centre de Afriko kaj ties arto”. Unuafoje estis videblaj kaj artaĵoj, kiuj datumas de 5000 jaroj antaŭ nia erao kaj modernaĵoj, ĉefe el privata kolekto de Jean Pigozzi el Svislando.

22 Reviviĝo de mortinta lingvo

Oni kutime rigardas la manksan kiel mortintan lingvon. En la jaro 1800, naŭ dekonoj de la loĝantoj estis gaellingvanoj, sed en 1974 restis nur unu denaska flua parolanto, nome Ned Maddrell [madrel], kiu tiam estis 98-jara. Nun vizitantoj al la Manksa Insulo konstatas ion vere eksterordinaran. En 2001 deklaris 1689 insulanoj, ke ili estas parolantoj de la lingvo.



POLITIKO

Nov-Zelando	8
Denove Clark - denove koalicio	
Albanio	9
Kaj la prezidanto vane atendis	
Katalunio	10
Survoje al pli granda memregado	
Senbrida naciismo en la hispana dekstro	
Opinio	12
Nova Usona Jarcento	

SPIRITA VIVO

Debato	13
Abortigo kaj la biblio (2)	

ARTO

Afriko	14
500 ĉefverkoj en Monako	

MODERNA VIVO

Albanio	16
Atleto de kristanismo	
Irano	16
Embargo kontribuis al katastrofo	
Japanio	17
Februaraĵoj festoj	
Komentario	18
Kie kalumnioj skuas la animon	
Aŭstrio	19
Ne tiom rapide, sinjoro	

EKONOMIO

Demokratia Respubliko Kongo	20
Privatiĝo de la publika transporto	
Madagaskaro	21
Rizo: senelira problemo	

LINGVO

Eseo	22
Reviviĝo de mortinta lingvo	

LIBROJ

Ruzo en rifuzo	24
Idealismaj rebriletoj malantaŭ la skeptika fasado	25

SERCO KAJ SATIRO

Pri kutimoj kaj kalsonoj	26
La plej trompita homo	26

Abonoj	4
Enkonduko	5
Leteroj	6
El mia vidpunkto	7
Anoncetoj	27

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank, 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al financo@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko traktata je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	25	5	10
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	50	5	9
Brazilo	EUR	23	25	5	10
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	25	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	25	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongono	EUR	41	42	5	10
Hungario	EUR	23	25	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	42	5	10
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6600	6900	860	1220
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	42	5	10
Kroatio	EUR	23	25	5	9
Latvio	EUR	23	25	5	9
Litovio	EUR	23	25	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	370	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugalio	EUR	36	41	5	9
Rusio	EUR	23	25	5	9
Singapuro	EUR	41	42	5	10
Slovakio	EUR	23	25	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	42	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	71	82	9	14
Tajvano	EUR	41	42	5	10
Usono	USD	61	63	8	13
Bazo eŭropa	EUR	46	50	5	9
Bazo ekster-eŭropa	EUR	48	50	5	10

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiilo +32 32 33 54 33.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: esperfed@ans.com.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel. 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnicky@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estono:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schweringen (Volksbank Grafenschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@Esperanto-ct.org.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Italaj:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japanaj:**
 - KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. Reto: kleg@mvf.biglobe.ne.jp.
 - Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. jei@mre.biglobe.ne.jp.
 - **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
 - **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@Esperanto-ct.org.
 - **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperant@unitel.co.kr
 - **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miauguat@racsa.co.cr
 - **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 - **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
 - **Litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: stralaim@takas.lt.
 - **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
 - **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
 - **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
 - **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. Reto: gdewar@ihug.co.nz.
 - **Pola:** Sribu al la eldonejo kaj pagu al Danuta Leyk, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328@PKO BP XIV O/W/wa.
 - **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorceka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
 - **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartskivsvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, S-242 94 Hörby. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org
 - **Venezuela:** Peter Jaimez, Apartado 3482, Caracas 1010A. Reto: peterjaimez@tutopia.com.



Prioritato 1

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 27a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el **MONATO** nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de **MONATO** por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopilo: +32 3 233 54 33; retpoŝto: monato@fel.esperanto.be, Skype-telefono: fel-monato; valida anonstarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: s.h.maul@t-online.de

revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Matí Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.

grafiko:

Ferriol Macip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Reto: moonmont@pt.lu.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Reto: rotsaert@esperanto.be.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 59, B-4700 Eupen, Belgio. Reto: jp@fel.esperanto.be.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Reto: Evgeni.Georgiev@gmx.at.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Reto: edmund820@rano.org.
- **Leteroj:** **MONATO**, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Reto: monato-leteroj@fel.esperanto.be.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Reto: kolker@stratos.net. **Nota:** Librorcenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprinacie. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Reto: syama@qf6.so-net.ne.jp.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Reto: mgglez@enet.cu.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reto: paulgubbins@tiscali.co.uk.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Jãoa Motter 98, 81210-260 Curitiba, PR, Brazilo. Reto: gmattos@brturbo.com.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reto: paulgubbins@tiscali.co.uk.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Reto: teccardt@hotmail.com
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Reto: gerrit.en.madzy@planet.nl.
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Reto: grigorij@lenta.ru.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Reto: s.h.maul@t-online.de.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Reto: Evgeni.Georgiev@gmx.at.

Eble vi jam vidis en la listo de la kolofono, ke ni havas novan redaktoron pri scienco. Lia antaŭulo Manuel Pancorbo jam de pluraj monatoj deziris demisii, ĉar mankas al li tempo por dediĉi sin sufiĉe al la envenantaj manuskriptoj. Transprenis lian taskon Thomas M. Eccardt el Nov-Jorko, abonanto kaj kunlaboranto de **MONATO** ekde 1993. Li estas komputil-programisto kaj fervora leganto de *Scientific American* kaj *Science News*. Certe nome de vi ĉiuj ni deziras al Thomas agrablan kaj fruktodonan kunlaboradon kaj multajn ne tro komplikajn manuskriptojn! Al Manuel ni dankas pro la tasko, kiun li tre bone plenumis dum ĉ. 18 monatoj. Ni esperas, ke li ekster la redaktora skipo ankoraŭ longe restos abonanto de **MONATO** kaj, kiu scias, eble kiel verkanto!

Lia plendo pri tempomanko memorigas al ni, ke redaktado ofte estas sufiĉe streĉa laboro, precipe kiam abundas manuskriptoj. Tiun laboradon legantoj ne vidas, ĉar ili ne scias, en kia stato alvenis manuskripto, ĉu ĝi estis perfekta (malofte) aŭ eble bezonas detalan poluradon. Redaktoro krome devas decidi, kiun aktualecon havas artikolo. Por tio ni uzas sistemon de prioritaticiferoj; cifero 1 ekzemple signifas, ke koncerna artikolo devus aperi tuj, do en plej venonta numero. Sed okazas – kiel denove dum la pasintaj monatoj – ke la redakcia sekretario sidas antaŭ amaso da artikoloj kun prioritato 1, sed ke ne por ĉiuj estas loko en la aktuala numero. „Bedaŭrinde mia ministro pri financoj ne permesas eldoni 56-paĝajn numerojn,” ĝemas Paul Peeraerts. Kiel solvi la problemon? Eble ŝanĝi la financ-ministran? Aŭ ĉu vi havas pli bonan ideon? Kiel ajn, vi povas esti certa daŭre legi (relative) aktualajn artikolojn.

Sincere via

Stefan MAUL



Al kiuj la olimpiaj ludoj justus?

Por la Olimpikoj 2012 kandidatis kvin urboj: Londono, Madrido, Moskvo, Nov-Jorko kaj Parizo.

La lastaj someraj olimpiaj ludoj jenas:

25a:	1992	Barcelono	Hispanio	Eŭropo
26a:	1996	Atlanta	Usono	Ameriko
27a:	2000	Sidnejo	Aŭstralio	Oceanio
28a:	2004	Ateno	Grekio	Eŭropo
29a:	2008	Pekino	Ĉinio	Azio
30a:	2012	Londono	Britio	Eŭropo
Laŭ vico de la mondpartoj en 2012 sekvu ne Eŭropo, sed Sud-Ameriko aŭ Afriko.				

Tamen en Hispanio kaj Usono la olimpiaj ludoj okazis antaŭ nelonge, en Moskvo ili estas aranĝitaj nur unu fojon en la jaro 1980, kaj tiam ilia gastiglando estis tute alia, la totalisma Sovetio. Kelkaj sportaj programeroj akvaj kaj aliaj okazis eĉ ne en Moskvo, sed aliorbe. Do, en Rusio (ne plu Sovetio) la Olimpikoj neniam estis aranĝitaj! En Britio la lastaj estis en la jaro 1948 kaj en Francio en la jaro 1924 (temas nur pri la someraj Olimpikoj).

Laŭ antaŭmenciitaj faktoj plej trafe la olimpiajn ludojn de la jaro 2012 povus pretendi Parizo aŭ eĉ Moskvo. Sed la lando Rusio estas nun en milito, kaj tial la Olimpia Komitato ne povis favori Moskvon. Kvankam ĝis la jaro 2012 ankoraŭ estas sep jaroj! Certe la Olimpia Komitato konsideris ankaŭ multajn aliajn faktojn, ekzemple ekonomiajn, sekurecajn kaj transportajn.

Se esti honesta, la Olimpikoj neniam okazis en Sud-Ameriko aŭ Afriko! Nuntempe per la Olimpikoj iuj ege profitas kaj politikumas, eĉ forgesante la devi-

zon por ĉiu partoprenantoj al la olimpiaj ludoj: Gravus ne gajni, sed partopreni.

Mi opinias, ke Brazilo povus aranĝi olimpiajn ludojn per helpo de aliaj landoj aŭ organizaĵoj. Brazilo estas ja kvinobla ĉampiono pri futbalo, sed la monda futbala ĉampionado el ĉiuj 17 estis aranĝita en Brazilo mem nur unu fojon en la jaro 1950. Ankaŭ aliaj landoj sud-amerikaj povus organizi Olimpikojn, ekzemple: Argentino kun Ĉilio, Argentino kun Urugvajo aŭ Argentino kun Brazilo laŭ la simila skemo de la lasta monda futbala ĉampionado: Japanio kune kun Sud-Koreio.

Sergei Paĥomov
Rusio

Stato de Afganio malbonas

Estas danĝere labori en Kabulo. Konsilindas, ke fremdulo ne alvenu la ĉefurbon de Afganio tute sola, sen helpopreta amiko. Afganoj sopiras al paco. Tial la lingvo de paco vekas ioman intereson ĉe ili. Mi dankas al Husnbanu Ghanzafar, la dekanon de la lingva kaj literatura fakultato en la kabula universitato por la ebligado de Esperanto-kurso en lando sub postmilita procezo. La libro- kaj vortarbezono en la paŝtua kaj la persa grandas.

Saidnabi SAIDILHOMZODA
Taĝikio

Gratulojn al Cherpillod

MONATO estas unike interesa, ĝi vere meritas esti sur poŝtmarko! Sed mankas klaro en komento pri *Klavarskribo* (MONATO 2005/11, p. 6). Mi ne tuj komprenis, ke temas pri muziko, ĉar tiu termino ne trafis *Enciklopedion* (1933), nek iun ajn eldonon de *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV).

Dankon al Antonio Valén pro *Klero kaj klaro delektos la leganton* (MONATO 2005/11, p. 22-23). Li trafe emfazis la genian resumon de Cherpillod, ke „transitiveco kaj akuzativo estas du apartaj mondoj”. Mi nur volus precizigi la lastan rimarkon: jam formiĝas angla lingvaro (analoge al la germanida, latinida, slava, balta ktp) el dekduo da regionaj lingvoj, kiuj sin tenas al komuna skribo. Skribo ne estas lingvo, kaj nur azeno povas insisti, ke iu lingvo havas (ne havas) supersignojn. Kaj pri finaĵoj: Esperanto havas nur 10 difinitajn finaĵojn, la angla – 14 regulajn, sed diverspoziciajn, kun 20 signifo, krome 300 neregulajn verbojn, kies diversaj signifoj povas havi samajn formojn.

Valdo BANATIS
Litovio

Federacia kancelierino

Kun multe da intereso mi legis la enkondukon de la ĉefredaktoro Stefan Maul *Kancelierino* (MONATO 2006/1 p. 5).

Mi estas franco kaj ne parolas nek skribas Esperanton tre bone kaj flue (iu eterna komencanto), sed mi povis tuj prononci la vorton „kancelierino” sen ĝeno; mi tute ne trovis la vorton langorompa kaj prononcis ĝin sen ajna problemo. Eĉ se la unuan fojon kelkaj personoj devus diri „kan-ĉeli-er-ino”, la duan fojon ili certe prononcos ĝin ĝuste sen iu ajn penso pri langorompo.

Uzi la vorton „kancelierino” estas tre bone, kaj mi subtenas ankaŭ titolojn „drino” kaj „fizikistino”, eĉ sciante, ke esperantistoj longe batalis por kaj kontraŭ la uzo de la ina sufikso en la titoloj. Eĉ en la malnova Francio de la malnova kontinento oni diras nun „*la procureure*” [la prokurér] (la prokurorino) kaj en Kebekio oni diras ekzemple: *Julie Carrier, professeure-chercheuse adjointe au Département de psychologie* (Julie Carrier, helpa profesorino-esploristino en la fakultato pri psikologio).

La karesnomon de s-ino Merkel francaj ĵurnalistoj prononcas „anĝi” aŭ „ajnĝi”, sed ne „ejnĝi”.

Stefan Maul skribas: „Cetere, anĝeloj laŭdifine ne havas sekson, do tutcerte ni ne devas diri Anĝelino Merkel.” Kial ne? Tute ne temas pri sekso, sed pri traduko de nomo kun itallingva deveno.

Guy WERLINGS
Francio

Kiel sendi viajn leterojn?



Sendu viajn leterojn por tiu ĉi rubriko al:

Flandra Esperanto-Ligo, MONATO
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen Belgio
Telekopiilo: + 32 3 233 54 33.
Retpoŝte: monato-leteroj@fel.esperanto.be

Pri la enhavo de la leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redaktanto havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al aperintaj artikoloj havas prioritaton.

Primitive

de Stefan MAUL

Ĉu ne estas brila ideo, kiun havis Nicholas Negroponte? Li volas havigi al ĉiu infano de la mondo komputilon. Kiel tio povas funkcii? Per simpla, malmultekosta komputileto, kiu ne dependas de kurento kaj telefon-reto. La de Negroponte fondita *Media Lab*, komputila laboratorio de elit-universitato MIT en Bostono (Usono), evoluigis tian komputilon, kiu kostas iom pli ol 100 usonajn dolarojn. Oni funkciigas ĝin per kranko: se infano turnas ĝin dum unu minuto, la komputileto disponas kurenton sufiĉan por duona horo. Al Interreto ĝi konektiĝas per radiosistemo.

La prototipon Negroponte prezentis dum monda pintkonferenco pri komunikada socio en Tunizo en novembro 2005. „Tio estas esprimo de mond vasta solidareco”, entuziasmis Kofi Annan, la ĝenerala sekretario de UN. Nun oni komencas produkti la minikomputileton, tamen ne en la koncernaj landoj, por kiuj ĝi estas destinita, sed en Tajvano; *Quanta* [kvanta], mond vaste la plej granda kompanio, konstruanta komputiletojn, produktos la unuajn sep milionojn da aparatoj por Ĉinio, Barato, Brazilo, Egiptio, Niĝerio kaj Tajlando.

Kiu profitos?

Kiu krom *Quanta* profitos? Nu, eble la afero utilos ankaŭ por la lingva hegemonio de Usono, ĉar la infanoj en la tria mondo lernos anglajn terminojn komputilajn. Sed ĉu tio vere utilos por ili? La registaroj de la koncernaj landoj devos aĉeti la komputiletojn kaj donaci al siaj lernantoj. Se ili faros tion, la uzota mono mankos por aliaj taskoj. „Kion ni vere bezonas, estas pura akvo kaj vera lernejoj”, kritikis delegito el Kameruno dum la menciita komunikada pintkonferenco. Delegito el Malio asertis, ke la projekto estas ruza merkataka instrumento, per kiu



Ĉu Negroponte sukcesos savi tiun ĉi infanon per senpagaj komputiletoj?

okcidentaj industri-landoj volas akapari la merkaton de la tria mondo sub mantelo de altruismo.

Diskriminacio

Fakto estas, ke oni disponigos al tria-mondaj infanoj primitivan aparateton, sen fiksita disko kaj la kutimaj programoj, kiujn disponas ordinaraj komputiloj, kiujn ricevas lernantoj en okcidentaj landoj. Oni povas paroli pri diskriminacio. Krome oni povas disputi, ĉu entute infanoj en Afriko, Azio kaj Sud-Ameriko vere bezonas Interreton por progresi, aŭ ĉu ne estus pli bone helpi ilin per multe pli ordinaraj aferoj, kiel edukado (gepatroj en triamondaj landoj tre ofte ne povas pagi lerneajn kotizojn) kaj medicino.

Jarfine de 2005 oni mond vaste memoris la cunamokatastrofon, kiu mortigis je Kristnasko 2004 laŭtakse 230 000 homojn. Tiam mondonacoj por la viktimoj abundis. Sed kiu interesiĝas pri la fakto, ke proksimume sama nombro da infanoj mortas ĉiumonate en Afriko pro malario? Ilin ne savas la centdolaraj komputiloj de Negroponte. Ĉu estas tro primitive eldiri tian komparon? Eble, sed ĉu oni ne super-taksas la valoron de Interreto por homoj, kies plej simplaj (primitivaj) vivbezonoj estas neglektataj? Por vivi digne, ili bezonas ne komputileton (per kiu – ho miraklo! – laŭ Negroponte la infanoj ankaŭ povas ludi), sed trinkakvon, nutraĵon, medikamentojn kaj tute ordinaran lernejon. Sed eble per la Interreto ili ja ekscios, kiel fosi putojn kun pura akvo ... ■

Denove Clark – denove koalicio



La parlamenta elekto de 2005 donis bizarajn rezultojn. La malgrandaj partioj ĝenerale perdis subtenon, sed ili gajnis influon en la nova registaro. Du el ili havas postenojn en la ministraro. La nova Maoria Partio kaptis kvar elekto-distriktojn, dum ĝia proporcio en la porpartia baloto pravigas nur tri mandatojn (memorindas, ke Nov-Zelando havas proporcian elektosistemon similan al tiu de Germanio).

*Helen Clark,
estrino de la Laborista Partio*

Dum la elektoj en septembro du partioj, la Laborista Partio kaj la Nacia Partio, ricevis proksimume saman elcentaĵon de la voĉoj (42 % kaj 40 %). Kiam aldoniĝis tiel nomataj specialaj voĉoj (tiuj de elektintoj, kiuj voĉdonis ekster siaj distriktoj), eblis la 1an de oktobro anonci la rezulton. Gajnis pli da mandatoj la Laborista Partio, estrata de Helen Clark [klak].

Tamen por krei registaron ne sufiĉis la 50 laboristaj seĝoj en la 121-seĝa parlamento. Kun la Progresema Partio (1 mandato) kaj la Verdula Partio (6) la Laborista Partio havus 57 voĉojn, kiuj ankoraŭ ne sufiĉus. Necesis marĉandi kun aliaj partioj, ĉefe kun Nov-Zelando Unue (7 mandatoj) kaj Unuigita Estonteco NZ (3), kiuj jam diris antaŭ la balotado, ke ili subtenos la partion, havantan la plej grandan nombron de mandatoj.

Kompromiso

Finfine troviĝis kompromiso: Nov-Zelando Unue kaj Unuigita Estonteco NZ havu po unu ministron ekster la kabineto. Ili subtenu la registaron rilate la koncernajn ministrejojn, sed voĉdonu pri aliaj aferoj laŭ siaj partiaj programoj. Tiel ili restas ekster la formala koalicio. Rezulte necesis ŝanĝi parton de la Kabineta Gvidlibro (konvencioj pri la funkciado de la kabineto) rilate la tiel nomatan kolektivajn ministraran respondecon.

La estro de Nov-Zelando Unue Winston Peters [pitrz] fariĝis ministro pri eksterlandaj aferoj. Kelkaj

*Tariana Turia
kunestras la Maorian Partion*



kontraŭis, dirante, ke Peters ofte kritikis troan enmigradon aparte el aziaj landoj. Tamen Helen Clark atentigis, ke Peters estas sperta politikisto (antaŭa vicĉefministro), kiu subtenas la politikojn de la Laborista Partio pri la kontraŭnuklea leĝo kaj pri militoj en Afganio kaj Irako.

Policanoj

Krome la registaro konsentis pri kelkaj proponoj de Nov-Zelando Unue, ekzemple pligrandigi pensiojn de 65 % ĝis 66 % de la meza enspezo, subvencii servojn por maljunuloj, enpostenigi mil pliajn policanojn kaj altigi la minimuman salajron al ekvivalento de proksimume ses eŭroj hore.

Pro la estro de Unuigita Estonteco Peter Dunne [pita dan], la ministro pri impostoj, la registaro konsentis interalie rekonsideri la leĝojn pri prostituaĉado kaj pri surstrata varbado kaj utiligi privatajn malsanulejojn, por ke pacientoj ĉe ŝtataj hospitaloj ne tiom atendu kuracadon.

Malkonsento

La Maoria Partio estas nova partio, tamen ĝi sekvas aron da aliaj provoj de maorioj unuigi siajn voĉojn en propra partio. Ilia kunestro Tariana Turia

estis ministro en la antaŭa laborista registaro, ĝis ŝi ekŝiĝis pro malkonsento pri leĝoj malavantaĝaj al maorioj koncerne la maron kaj plaĝojn.

Fine la registaro povas kalkuli pri 61 voĉoj. La opozicio havas 50 (aŭ 54, se la Maoria Partio voĉdonas kontraŭ la registaro). Helen Clark sukcesis gvidi minoritatan registaron tra du antaŭaj mandatperiodoj, do verŝajne ŝi same faros denove.

D. E. ROGERS

Partio	mandatoj 2002	mandatoj 2005
Labora	52	50
Nacia	27	48
NZ Unue	13	7
Verdula	9	6
Maoria	—	4
Unuigita Estonteco	8	3
AKI	9	2
Progresema	2	1
Sumo	120	121

ALBANIO

Kaj la prezidanto vane atendis

La unuan de novembro 2005 estis planita neoficiala vizito de la greka prezidanto Karolos Papulias en Albanio. Tiu laste renkontis la albanan prezidanton Alfred Moisiu en Janina (Grekio). Tiam Moisiu starigis demandon pri etnokultura albana loĝantaro en nord-okcidenta Grekio, nome ĉamoj, kiuj grandparte estis forpelitaj el Grekio en 1944.

La kialo estis absurda. En 1940 la italaj faŝistoj de Mussolini invadis Grekion el teritorio, jam okupita de ili en Albanio. Pro tio la iama greka reĝo dekretis t.n. militan leĝon kun Albanio, kiu ankoraŭ ne estas abolita.

Papulias vizitis Albanion antaŭ 1990 dum la totalisma reĝimo komunisma. Albanoj konsideras lin „kolombo de paco kaj amikeco inter ambaŭ landoj”. Li mem naskiĝis en la albana regiono Ĉamerio, kaj laŭdire mamnutris lin ĉama virino.

Amikeco

Tamen centmiloj da ĉamoj, rifuĝintaj en Albanio post 1944, ankoraŭ ne regajnis siajn rajtojn pri proprietaĵoj en Grekio. Kvankam en 1996 Grekio kaj Albanio subskribis amikeco-traktaton, grekaj juĝejoj ankoraŭ ne komencis retoni al ĉamoj iliajn laŭleĝajn riĉaĵojn.

Tial, okaze de la planita vizito de la greka prezidanto en suda Albanio, 150 manifestaciantoj pace atendis ekster la rendevuejo de la prezidantoj. Sed Papulias nuligis sian viziton kaj revenis al Grekio, dum la albana prezidanto lin vane atendis. La greka pravigo pri la nuligita renkontiĝo ne konvinkis: „La albana registaro toleris manifestacion de albanaj ekstremistoj ĉe la prezidanta rendevuejo.”

La albana prezidanto taksis la nuligon „senprecedenca kaj malagrabla okazintaĵo”. Kaj certe, malantaŭ la greka konduto sentebblas aliaj kaj pli profundaj kaŭzoj. Nelonge antaŭe vizitis Atenon la ĉefministro de Serbio Vojislav Koŝtunica, kiu akiris grekan subtenon por sia plano por la statuso de Kosovo.

Konkurantoj

Tiu ĉi plano kontrastas al la opinio de la albana registaro kaj mem de la albana prezidanto, kiuj postulas sendependecon de Kosovo disde Serbio kaj Montenegro. Tial la vizito de Papulias povus kolerigi Serbion, malnovan aliancanon de Grekio. Oni memoru, ke dum la milito en Kosovo en 1999 Grekio subtenis Miloŝeviĉon. La albana registaro argumentas, ke sendependa Kosovo plifortigus la politikan



Alfred Moisiu, prezidanto de Albanio

pozicion ne nur de albanoj en Balkanio, sed ankaŭ de kroatoj, slovenoj kaj aliaj, kiuj estu konsiderataj konkurantoj por Grekio kaj ties ambicioj en la regiono.

Tial paca manifestacio de ĉamoj dum vizito de greka prezidanto neniel povas esti konsiderata grava obstaklo kaj minaco al grekoj, kiuj siavice amase manifestaciis en Ateno dum vizito de la eksa usona prezidanto Clinton. Sed Clinton ne nuligis sian viziton, taksante la manifestaciantojn indikoj pri demokratia ŝtato.

Bardhyl SELIMI

KATALUNIO

Survoje al pli granda memregado



La 30an de septembro la kataluna parlamento voĉdonis por nova statuto de aŭtonomio. Temas pri leĝo, difinanta la rilatojn kaj distribuon de respondecoj inter la centra hispana kaj la aŭtonoma kataluna registaroj, kiu devus aktualigi la nun ekzistantan, aprobitan en 1979.

Hispanio fariĝis malcentrigita ŝtato fine de la 1970aj jaroj. Baldaŭ la aŭtonomio, atingita de katalunoj, eŭskoj kaj galegoj, fariĝis la normo, kaj la ŝtato fariĝis multaspekte, kvankam ne plene, federacio, sen nomi ĝin tia. La naciaj problemoj traku-

ras la historion de Hispanio dum la tuta 20a jarcento kaj fariĝis unu el la plej tiktaj punktoj de ĝia kompleksa politika panoramo.

Dum unuflanke la dekstra tendaro devenas de radikale naciisma tradicio, ligita al faŝismo, ĉefe eŭskoj kaj katalu-

Senbrida naciismo en la hispana dekstro

Tuj post la elekto de la nova kataluna registaro, koalicio de socialisto, maldekstraj sendependistoj kaj eko-socialistoj, en decembro 2003, Manuel [manué] Fraga, la honora prezidanto kaj fondinto de la Popola Partio kaj eksministro dum la faŝisma reĝimo de Franco [franko], memorigis en parolado, ke konstitucia devo de la armeo estas konservi la unuecon de la patrujo.

Tiaj pli-malpli vualitaj minacoj al puĉo, apenaŭ kredeblaj en preskaŭ 20-jara membroŝtato de Eŭropa Unio, fariĝis de tiam periodaj en la hispanaj naciismaj amaskomunikiloj. Tamen, post la aprobo de la propono de nova statuto de aŭtonomio fare de la kataluna parlamento, ili fariĝis preskaŭ ĉiutagaj.

Antonio [antonjo] Burgos, opiniisto de la madrida ĵurnalo *ABC*, epitetis la proponon puĉo, same kiel lia kolego Carlos Dávila [karlos dábila] de la pli radikala *La Razón*, kiu eĉ taksis ĝin pli terura ol la fiaska armea puĉo de 1981, kiam la registaro kaj la parlamento estis kidnapitaj de ĝendarmaro kaj tankoj surstratiĝis en Valencio.

Balkaniĝo

Ĝuste Alfonso Ussía, de *La Razón*, taksis tute ebla, ke tankoj baldaŭ ruliĝos tra la ĉefaj katalunaj urboj. Jam dum la periodo de la regado de la prezidinto de la registaro José María Aznar [ĥosé maria asnár], la danĝero de balkaniĝo de Hispanio estis fiks-

ideo lia, kvazaŭ li inklinus al konkurado kun la iamaj serbaj gvidantoj.

En tiu ĉi okazo ne nur Ussía relanĉis la teruran minacon, sed ankaŭ la direktoro de la dua ĉefa ĵurnalo de Madrido, *El Mundo*, tre proksima al la Popola Partio. Tamen, la plej akran tonon, kiel kutime, uzadas la ŝovinisma radio-ĉeno *COPE*, posedata de la hispana katolika episkoparo, kaj la ekstreme ekstrema *Diario de Valencia*, i.a. taksinta la katalunan parlamenton fanatika.

Entute la propono de statuto ricevis laŭtan malaprobacion en Hispanio, kaj tre aparte el la vicoj de la Popola Partio, kies ĉiunivelaj gvidantoj kvazaŭ konkuris, serĉante kiel eble plej malestimajn adjektivojn. María San Gil

noj – la du popoloj kun forta nacia sento kaj elstaraj sendependismaj partioj – evoluigis apartajn politikajn partiojn, kiuj akiris decidan pezon en la ŝtata parlamento dum la lasta jardeko.

Ĉefleĝoj

La rilatoj inter la centra registaro kaj tiuj de la 17 aŭtonomaj komunumoj kaj du aŭtonomaj urboj reguliĝas per unuopaj leĝoj, nomitaj statutoj de aŭtonomio, kiuj rangas kiel ĉefleĝoj en la hispana juro. Ili estas diskutitaj kaj aprobitaj unue en la respektiva aŭtonoma parlamento, poste diskutitaj kaj eventuale amenditaj en la ŝtata parlamento kaj fine referendumitaj de la civitanoj de la koncerna komunumo.

Dudek jarojn post ilia aprobo la statutojn oni konsideris eksdataj en diversaj komunumoj, sed dum la dua mandato de la dekstra Popola Partio (PP) (2000-2004), pro ties naciisma kaj ŝtat-centrismo agado, la procezo sentiĝis nepra en Katalunio kaj Eŭskio.

Sendepende de la venkonta partio, la ĉefa celo de la nuna parlamenta



Elstaraj membroj de la kvar grupoj, subtenantaj la statut-proponon, aplaŭdas post ĝia aprobo en la kataluna parlamento.

periodo en Katalunio, komencita per la elektoj de novembro 2003, senkonteste estis la redaktado de nova statuto. Sed kiam la Socialisma Partio venkis en la hispanaj balotoj de marto 2004, montriĝis unika ŝanco, por ke la propono, elironta de la kataluna parlamento, estu akceptita de la ŝtata.

Lojaleco

Dum 19 monatoj la kvin parlamentaj grupoj diskutis kaj kune redaktis la novan proponon. Estis klare de la komenco, ke la Popola Partio de Katalunio (PPK) (15 el 135 parlamentaj seĝoj) fine voĉdonos kontraŭ ĝi, sed longa tradicio de lojaleco kaj reciproka estimo permesis, ke en la unua lego estis interkonsentita de ĉiuj la larĝa plimulto de la artikolaro. Post la fina voĉdono, kiam 89 % de la parlamentanoj voĉdonis por la fina leĝopropono en solena sesio, ankaŭ la grupestro de PPK aliĝis al la komuna foto de partiestroj.

Tiu fina foto, en festa etoso, kvankam ne por ĉiuj, ne kaŝis ekstreme viglan intertraktadon, kaj eĉ dramecan lastapuntan interkonsenton en la antaŭa tago, kiam la parlamento debatis ĝis la dua matene, ĝis estis atingita vortumado pri la ŝlosila ĉapitro pri financoj, kontentiganta la kvar grupojn, kiuj subtenas la novan statuton.

Post la lasta etapo de la PP-registaro rezultis kristale klare, ke ĉio devis esti nigre sur blanke detaligita en la nova eldono de la statuto, por eviti malfavorajn unuflankajn legojn fare de la hispana registaro, kaj eĉ de la konstitucia kortumo, en kies membro-elektado preskaŭ ne rolas la politikaj partioj de la periferiaj nacioj. ▶

[ñil], prezidantino de la eŭska PP, eĉ asertis, ke la kataluna statuto estis oksigena balono por ETA, la eŭska armita organizaĵo.

Urtikario

Ankaŭ kelkaj elstaraj membroj de la Socialisma Partio kvazaŭ partoprenis la ludon, kiel Francisco Vázquez [fransisko baskes], prezidanto de la Hispana Federacio de Municipoj kaj Provincoj, kiu diris, ke la antaŭparolo de la statuto, kie oni deklaras Katalunion nacio, kaŭzas al li urtikarion.

Plej alarmaj estis la deklarioj de ĉefstabeŝto Félix Sanz Roldán [feliks sans roldán] pri la maltrankviliĝo de la armeo pri la unueco de Hispanio, sed tio ne kaŭzis admonon, almenaŭ publikan, fare de liaj registaraj superuloj pro la devo de armeanoj silenti en politikaj debatoj. Ankaŭ la prezidanto de la Banko de Hispanio, sindikates-

troj kaj eĉ la hispana ombudsmano (popoldefendanto) montris siajn rezerveojn pri la propono.

Antaŭ tiel fortegaj premoj la registara prezidanto Rodríguez Zapatero [rodrigues sapatero], promesinta akceptigi en la hispana parlamento ĉian proponon, larĝe interkonsentitan en la kataluna parlamento kaj laŭan al la konstitucio, klopodas kiel eble plej senvunde eltiri sin el la embaraso. Akorde kun sia famo pri dialogemo, li lanĉis, ke li havas eĉ ok eblojn, kontentigontajn ĉiujn pri la disputata aserto, ke Katalunio estas nacio – tiu vekanta la plej sentemajn reagojn en Madrido.

Sed meze de krucmilita etoso de senbrida naciismo de la hispana dekstro, la atingo de interkonsento inter ĝi kaj la 89 % de la katalunoj ŝajnas entrepreno donkiĥota.

haf



La parlamento de Katalunio

► Histeriaj krioj

La nova statut-propono komenciĝas per bombasta antaŭparolo, sen jura valoro, en kiu oni memorigas pri la kontinua memregado de Katalunio dum jarcentoj kaj deklaras la rajton de memdispono, kvankam ĝi poste ne aperas en la jur-valida parto. Tiu antaŭparolo, analoga per sia retoriko al multaj konstitucioj, vekis eĉ histeriajn kriojn en Hispanio (vidu la apudan artikolon).

Kvankam la politikaj deklarioj ankoraŭ preskaŭ ne pritraktas tion, laŭ la spertuloj la statut-propono levos du ĉefajn diskutojn.

Unuflanke, temas pri la starigo de duopaj rilatoj parti-egalaj inter Hispanio kaj Katalunio en kreotaj aŭ reformotaj lig-organoj. El la centrisma vidpunkto, Katalunio estas nur unu inter multaj komunumoj, kaj fariĝus multe pli oportune, se ĝi akceptus aliĝi al multopaj organoj, kie ĉiuj aŭtonomaj komunumoj samtempe intertraktas kun la centra potenco. Al tio katalunoj oponas, ke la diferencoj inter la deziroj pri memregado de katalunoj kaj ĉiuj aliaj, krom eŭskoj, estas grandegaj kaj ke la hispana konstitucio difinas malsamajn nivelojn de aŭtonomeco, laŭ la deziroj de ĉiuj regionoj kaj nacioj de la ŝtato.

Politika marĉandado

Aliflanke, mono fariĝis delonge la ĉefa batalkampoj. La centra registaro

regule agnoskas, ke Katalunio estas subfinancata, sed la kvanto de tiu mono dependadas de politika marĉandado kaj de la pezo de katalunismaj partioj en la hispanaj kortesoj en ĉiu parlamenta periodo. La statut-propono fiksis objektivajn kriteriojn, kiel fiskajn

bilancojn, por mezuri la imposto-kvoton enspezigendan de Katalunio kaj la parton transdonendan al la ŝtato, page al ĝiaj servoj kaj kiel solidareco kun la pli malriĉaj regionoj.

La punkto montriĝas ekstreme grava, ĉar ekzistas diversaj manieroj kalkuli tiujn bilancojn, kaj neniu hispana registaro kuraĝis publikigi ilin, malkiel ekzemple okazadas en Germanio. Tiuj punktoj, kaj aliaj, estas diskutataj pro sia eventuala kontraŭkonstitucieco. Kvankam la konsulta jur-organo de la kataluna parlamento pravigis la tekston, kelkaj renomaj juristoj esprimis dubojn pri difinitaj punktoj.

La diskutoj en la hispana parlamento longiĝos ĝis marto aŭ aprilo, kaj oni kalkulas, ke la referendumo por la aprobo de la statuto okazos en junio. Tamen tiu ĉi kalendaro estas tre ŝanĝebla pro la eksterordinare batalema opozicio de la Popola Partio.

Hektor Alos i Font

OPINIO

Nova Usona Jarcento

La totalismaj reĝimoj de la 20a jarcento estiĝis, ĉar influhavaj homoj aŭ ne atentis pri la kreskanta danĝero, kreata de demagogoj kaj fanatikuloj, aŭ ĝin simple ignoris. La saĝa hispandevena usona filozofo George Santayana skribis en 1905: „Tiuj, kiuj ne povas rememori la pasintecan, estas kondamnitaj ripeti ĝin.”

La retejo www.newamericancentury.org montras tendencan kaj minacon eble pli gravajn kaj pli potencajn, ol eĉ la ideologioj de Hitlero kaj Stalino. Vidiĝas mapo, montranta la amplekson de usona influo en la mondo. Sub la mapo legiĝas la jenaj alineoj, subskribitaj de iu William Kristol, prezidanto:

La Projekto por la Nova Usona Jarcento estas senprofita eduka

organizaĵo, dediĉita al kelke da fundamentaj asertoj, nome, ke usona gvidado estas bona kaj por Usono kaj por la mondo, kaj ke gvidado tia postulas potencon militan, energion diplomatan kaj akcepton de principoj moralaj.

La Projekto por la Nova Usona Jarcento intencas, per eldonado de informiloj, esplor-referajoj, propaganda ĵurnalismo, konferencoj kaj seminarioj, klarigi, kion implicas usona tutmonda gvidado. Ĝi strebos ankaŭ subtenigi vigran kaj laŭprincipan politikon pri usona interveno internacia kaj stimuli utilan publikan debatadon pri eksterlanda kaj defenda politikoj kaj pri la rolo de Usono en la mondo.

Superfluas pliaj komentoj.

Garbhan MacAoidh

Abortigo kaj la biblio (2)

Per tiu ĉi artikolo mi reagas al artikolo en MONATO 2005-7/8, paĝo 17 de W. Simcock. Kun intereso mi legis la opinion de sinjoro Simcock, laŭ kiu „la biblio prezentas preskaŭan katalogon de kontraŭkoncipiloj kaj abortigoj.” El liaj enkondukaj linioj mi konkludas, ke li iam havis malagrablajn spertojn kun kristanoj, kiuj opiniis, ke ĉiu vorto de la biblio estas senerara kaj ĉiam aplikebla vero. Pro tia sperto li nun volis demonstri, ke la biblio ne kontraŭas abortigon, sed eĉ propagandas ĝin.

Mi certe ne apartenas al kelkaj ekstremaj kristanoj, kiuj erare opinias, ke ĉiu unuopa versiklo el la biblio estas senerara, ĉiam valida kaj ĉiam aplikebla vero. Sed por honeste kritiki tiun malnovan libron, necesas ankaŭ legi atenteme la kritikotajn tekstojn. Aliokaze povas okazi, ke la kritikanto – eble senintence – diras malveron.

Sinjoro Simcock volis pruvi per multaj versikloj el la biblio, ke la biblio ne kontraŭas abortigon. Mi atenteme tralegis en la biblio la indikitajn versiklojn, sed devis konstati, ke neniel ili parolas pri abortigo. Tia argumentado ne estas honesta.

Se ekzemple la biblio raportas realece pri la „normala” krueleco de militoj (ekzemple en 2 Reĝoj 8: 12; Naĥumo 3: 1 kaj Jeĥezkel 9: 5-6), li akuzas, ke la biblio „pravigas kaj instigas la mortigon de fetoj kaj novnaskitoj”. Ĉu do ankaŭ MONATO pravigas kaj instigas al krimo, kiam ĝi raportas pri krimoj?

Aliloke li asertas, ke la biblio permesas al gepatroj manĝi la proprajn idojn. Li tiurilate indikis versojn el la Plorkantoj 2: 20 kaj 4: 10. Tiuj kantoj estis verkitaj de persono(j), kiu(j) postvivis la detruon de Jerusalemo pere de la babela armeo en la jaro 587 antaŭ Kristo. La babelaj soldatoj ne nur detruis ĉiun muron en la tuta urbo, sed ankaŭ masakris ĉiun jerusalemanon,

sendemande ĉu estis graveda, vira, ina, juna aŭ maljuna persono. La postvivintoj de tiu masakro estis en tre mizera situacio. Unu el ili skribis tiujn plorkantojn kaj plendis al sia dio, ke nun ne plu ekzistas ia humaneco kaj etiko, ja eĉ patrinaj manĝas la viandon de la propraj infanoj. Sed la versoj ja kritikas kaj neniel permesas tian agadon!

Aliaj postvivintoj de tiu masakro estis transportitaj al Babelo, kie ili estis sklavoj. Ili kantis aliajn plorkantojn, ekzemple psalmon 137. La unuaj versoj rememorigas la malĝojan situacion kaj la okazintaĵojn en la malproksima Izraelo. La biblio ne cenzuras iliajn sentojn. Ĉu ni mallaŭdu la viktimojn, se ili en sia plorkanto esperis, ke la kulpuloj de tiuj masakroj spertu la samon? Por ni modernaj homoj, kiuj eble neniam spertis tian masakron, por ni estas tro facile diri, ke „oni” ne parolu tiel malafable. Tamen ne ĉiu homa preĝo kongruas kun la dia volo.

Rilate al aliaj versoj aŭ versikloj mi tute ne komprenas lian kritikon. Ekzemple Eliro 21: 22 estas leĝo, kiu kun etaj adaptoj pli malpli ĝis hodiaŭ estas uzataj en Eŭropo: Se viro senintence batas gravedan virinon kaj tiu ĉi pro la bato abortos, sed ne mem malsaniĝos, tiam la viro pagu monpunion laŭ la decido de juĝistoj.

Ĝis antaŭ kelkaj jardekoj multaj beboj mortis mallongan tempon post sia naskiĝo. Levidoj 27: 6 kaj Nombroj 3: 15-50 realece scias tion, kaj tial parolas pri infanoj, kiuj estas pli aĝaj ol unu monato. Ankaŭ ĉi tie la biblio ne opinias, ke fetoj aŭ novnaskitoj estas homoj sen vivrajto.

Mi ne povas ĉi tie refuti ĉiun tezon de sinjoro Simcock. Tial mi petas la legantojn mem atente legi ĉiun akuzitan teksteron kaj ĝian kuntekston en la biblio kaj poste decidi ĉu sinjoro Simcock pravas aŭ ne. Sed mi ankoraŭ



devas klarigi la tekston en Nombroj 5: 11-31. Ne temas pri „metodo por abortigi feton”; temas pri tiel nomata „dia decido”, afero kiu ekzistas en multaj religioj: Se edzo opiniis, ke lia edzino amoris kun alia, sed ne havis pruvon, tiam li iris kun sia edzino al la templo. Tie ŝi preĝis al dio, ke dio punu ŝin, se ŝi estus kulpa. Poste ŝi oferis oferdonon al dio kaj trinkis sanktan akvon el la templo. La Izraelanoj kredis, ke dio punus ŝin, se ŝi estus kulpa, kaj ke nenio okazus, se ŝi estus senkulpa. Eble tia „dia decido” estas stranga superstiĉo el malproksima epoko, sed certe ne temas pri metodo de abortigo.

Ofte en la biblio homo en danĝero krias al sia dio, ke tiu helpu lin, ĉar tiu ja formis la preĝanton en la ventro de sia patrino. Legu ekzemple en Jeremia 1:5 aŭ Psalmo 22: 10-11. Tio signifas, ke la homoj en Izraelo estis konsciaj, ke ĉiu feto, ĉiu bebo estas homo kaj kreita de dio kaj kun vivrajto. Kontraste al tio estis la opinio en la greka aŭ romia kulturo. En Romio la patro de la familio (latine: *pater familias*) havis la rajton post la naskiĝo decidi, ĉu la bebo vivu, aŭ ĉu ĝi mortu. Ekzemple arkeologoj trovis en iamaj bordeloj amason da kadavroj de viraj beboj. La prostitutinoj mortigis siajn knabetojn, ĉar ili ne uzeblis en la bordelo. En antikva tempo nur la judoj kaj la kristanoj (tiam juda sekto) rifuzis tian kutimon. Ili kredis, ke dio kreas en la ventro de la patrino ĉiun homon, kaj tial neniu rajtas mortigi bebon aŭ feton.

Jen kion opinias la biblio pri abortigo.

Wolfram ROHLOFF

500 ĉefverkoj en Monako



Monako estas eta princlando sude de Francio, kiu tradicie vivas el bankoj, kazino kaj turismo (fame konataj estas la kakta ĝardeno kaj la akvario). Dum la lastaj dek jaroj, sub instigo de princo Rainier [renjé] la 3a konstruiĝis tre moderna enroka stacidomo, artefarita haveno kaj Grimaldi Forum, malfermita al diversaj aranĝoj: koncertoj, dancoj, kongresoj, ekspozicioj. Nun ĝi prezentis „unikan vojaĝon centre de Afriko kaj ties arto”. Unuafoje estis videblaj kaj artaĵoj, kiuj datumas de 5000 jaroj antaŭ nia erao kaj modernaĵoj, ĉefe el privata kolekto de Jean Pigozzi el Svislando.

Artoj el antikva subsahara afrika beleco, perfekteco, harmonio karakterizas la prezentitajn artaĵojn. Ili estas ligitaj al la sociaj kaj religiaj tradicioj. Tie eblas maltrovi aĵojn el Sudano de antaŭfaraona epoko, certe la fonto de ilia arto. Ankaŭ multajn lignaĵojn, ĉefe maskojn, kiuj celis kaŝi personecon aŭ montri alian aŭ serĉi protekton. Idealigo de la personeco kondukis al idealigo de portretoj, simetria, ripozigaj, sed dum la vizitanto promenas tra la 4000 m² de la ekspozicio, li estas trafita de la diverseco de vizaĝesprimoj. Se iuj emas konsideri afrikan arton „negra”, „primitiva”, post vizito de tiu ekspozicio, ili dirus nur „arto”: el lfe, latunaj portretoj de la reĝoj de la 11a jarcento, terakotaĵoj el la Nok-civilizo aŭ bronzaĵoj el Igbo-Ukwu (Niĝerio). Tiuj homoj, muzikistoj, reĝoj, kokoj memorigis al mi ĉinajn skulptaĵojn. Retroviĝis en la nekropolo de Bura-Astoda Sikka (nord-oriente de Niameo) 400 funebraj potoj kun ĉevaloj el la jaroj 200 ĝis 1000.

La famaj dogonoj el Malio prezentas kaj lignajn kaj ŝtonajn skulptaĵojn, kiuj rolis kiel ligiloj kun dio. Sekvas eburaj (kuleroj, muzikiloj el Benino), sur kiuj kuŝas krokodilo, se ĝi ne estas la pintingo. Tre esprimopovaj estas

la lignaj maskoj el Bamama (Niĝerio, 17a jarcento). Interese estas, ke ekde la 19a jarcento en skulptaĵoj miksiĝas ligno, ledo, plumoj, perloj, metalo ktp. La bronzaĵoj, kiuj ornamis palacon en Oba (Benino) montras, ke tiu palaco estis pli granda ol la tiama borsejo en Amsterdamo!


Rilatoj kun la eŭropa arto

Taksante tiun arton tra ĝiaj kriterioj, eŭropaj kritikistoj emas paroli pri realismo aŭ kubismo (la homaj partoj estas sendependaj kaj la korpo ne formala) aŭ ekspresionismo (kun libervola akcentado de korpaj partoj, mano, piedo, muskoloj) aŭ surrealismo (enkondukanta imagitan realecon). Ĉar fine de la 19a jarcento kaj komence de la 20a multaj eŭropaj pentristoj (ekzemple Picasso, Derain, Léger, Modigliani, Nolde) estis allogitaj de la afrikaj artaj verkoj, alportitaj tiam kiel simplaj manartaĵoj, iu sekcio fare de Léger, Modigliani, Nolde aŭ Pechstein montras la rilatojn: ĉu kopioj aŭ inspiroj?

Nuntempa afrika arto

Vera eltrovo estis la prezento de la nuntempa afrika arto. La ĉefa kriterio





„Kimbembele Ihunga” de Bodys Isek Kingleez.



Kontribuo de George Lilanga el Tanzanio al la ekspozicio.



„Sen titolo” de François Thango.

por elekto estis, ke la artisto devas esti afrikano kaj vivi en Afriko. Multaj artaĵoj havus lokon en la ĉefaj mondaj muzeoj pri nuntempa arto, sed bedaŭrinde, nekono aŭ snobismo lasas ilin en privataj kolektoj. La vizitanto zigzagas aŭ serpentumas en labirinto, kie pentraĵoj, skulptaĵoj, fotoj, muntaĵoj, kungluaĵoj, potoj, totemoj, akvareloj, desegnaĵoj, bildoj ktp prezentas buntan kaj koloran bildon pri tiu kontinento, kie regas elturniĝemo, reutiligado kaj respekto de la prauloj. Ĉio retroviĝas en la nunaj artaĵoj: mi tiel malkovris la plurkolorajn skulptaĵojn kaj pentraĵojn de Lilanga (Tanzanio) pri kulto de prauloj, la totemojn el terakoto de Camara (Senegalo), la tombojn de Efiambelo (Madagaskaro). El plastaj botelegoj, Hazoume el Benino daŭrigas la tradicion de maskoj dum Dakpogan (Benino) faris ilin el veturilpecoj. Mansaray (Siera-Leono) fabrikas maŝinon, kiu memorigas la „modernajn tempojn” de Chaplin. Gedewon (Etiopio) desegnas serion de talismanoj por kuraci la korpon kaj animon. La pentraĵoj de Moke (D. R. Kongo) similas al tiuj senreliefaj bildoj, en kies truon vi metas la kapon kaj fotiĝas: nur la vizaĝo vivas. Bouabre (Ebur-Bordo) prezentas 448 bildojn poŝformatajn. Ne eblas listigi



„Blanka masko”, unu el la ekspoziciaĵoj en Monako.

ĉiujn, ekzemple Ojeikeje (Niĝerio) kies fotoj de harplektaĵoj havas etnan, kulturan kaj artan valoron.

La artistoj estas junaj: la plej juna naskiĝis en 1970, la plimulto naskiĝis en la 30aj ĝis la 50aj jaroj. La plej lastan pentraĵon „Tsunami” faris Onyango en 2005.

Post Monako, la ekspozicio iros al Toronto: do se vi estas en Kanado ne maltrafu la okazon; afrika arto indas tutmondan diskonigon.

Renée TRIOLLE

ALBANIO

Atleto de kristanismo



La placo Skanderbeg, centre de Tirano, memorigas ne nur pri albana sed ankaŭ pri eŭropa heroo.

La jaro 2006 estas deklarita de la albana registaro la „jaro de Skanderbeg” okaze de la 600-jariĝo de la naskiĝo de la albana nacia heroo. Skanderbeg (1405-1468) sukcese organizis rezistadon de albanoj en la tiel nomata sud-orienta eŭropa roka

ĝardeno kontraŭ otomanaj armeoj, minacantaj Okcidenton.

Pro la rezistado la turkoj ne realigis siajn planojn invadi centran Eŭropon. Tial la papo invitis Skanderbeg al Romo kaj nomumis lin „atleto de kristanismo”. Tiamaniere albanoj,

la solaj katolikoj en la iama Bizanca Imperio, ne nur defendis sian patrujon, sed ankaŭ kontribuis al la protektado de la okcidenta civilizacio.

Milit-paŭzo

Skanderbeg (el la turka Iskender Bej) nomiĝas ĉe albanoj Gjergj Kastrioti. En 1444 li fariĝis gvidanto de la albanaj princoj ĉe la Kunveno de Lezha kaj en 1461, helpe de la papo kaj la registaroj de Venecio, Napolo kaj Hungario, devigis la turkojn subskribi dekjaran milit-paŭzon.

En 1463 li rezignis pri la milit-paŭzo kaj sen la iamaj aliancanoj defiis la turkojn. Post lia morto albanoj daŭre rezistis, ĝis en 1478 falis la urbo Shkoder kaj turkoj fininvadis la tutan landon. Dum kvin jarcentoj, ĝis 1912, albanaj teritorioj restis sub otomana regado. Tiam duono de la teritorioj inkluziviĝis en la sendependa ŝtato Albanio, dum la cetero en kvin najbaraj slavaj kaj greka ŝtatoj.

Bardhyl SELIMI

IRANO

Embargo kontribuis al katastrofo

Trouzo de iranaj aviadiloj kaj nesufiĉaj riparoj plej verŝajne kaŭzis akcidenton en Teherano, kiam maŝino C-130 de la irana aer-armeo paneis kaj kraŝis apud 10-etaĝa loĝejo.

Pereis ĉiuj 94 pasaĝeroj kaj oficistoj en la aviadilo kaj kromaj 13 homoj sur la tero. La pasaĝeroj estis plejparte raportistoj de iranaj televidkanaloj, radiostacioj, novajagentejoj kaj ĵurnaloj.

Inter la mortintoj troviĝis konataj televidaj raportistoj.

Okazis la katastrofo posttagmeze la 6an de decembro pasintjare, kiam la aviadilo ĵus ekflugis el Mehrabad-flughaveno en Teherano survoje al la sudo de Irano, kie la ĵurnalistoj estis raportontaj pri armeaj manovroj.

Regis en televidaj kanaloj etoso kondolenca. Fotoj kaj filmoj pri la mortintoj estis daŭre montrataj, kaj preskaŭ

ĉiuj vestis sin nigre.

Alia kontribuajo al la akcidento estas usona embargo, kiu malpermesas al Irano aĉeti usonajn aŭ eŭropajn aviadilojn (aŭ aviadilojn, kiuj enhavas usonajn materialojn). Do Irano aĉetas rusajn aviadilojn aŭ malnovajn aviadilojn de aliaj landoj. Sed tio pligrandigas la riskon de aerakcidentoj kaj malsekurecon de flugvojaĝoj.

Keyhan SAYADPOUR

Februaraj festoj

La 11a de februaro estas la tago de la fondiĝo de Japanio. Sed malmultaj ekster Japanio scias, kiel oni festas la tagon, kaj kial.

La tagon de la fondiĝo de Japanio oni festas pro mito kreita por firmigi la imperiestran aŭtoritaton. La 11an de februaro en la jaro 660 antaŭ nia erao surtroniĝis la unua imperiestro, Ĵinmu. Ĝis la malvenko de Japanio en 1945 tiu tago nomiĝis *kigen-setu* (feria tago por festi la komencon). Oni proklamis, ke Japanio estas la lando de Dio, regata de sanktaj imperiestroj, kies nomojn lernantoj devis parkere memori. La imperiestrojn la lernantoj estimis kiel diojn, kaj poste ili estis elsenditaj al batalkampoj por morti por la imperiestro.

Post la malvenko venis usona regado. Usonanoj provis demokratiigi Japanion. Ili malpermesis la mitojn, kiuj estis dogmoj kontraŭsciencaj kaj por-imperiestraj. La tagon *kigen-setu* la usonanoj nuligis. Sed en la 70aj jaroj ĝi reviviĝis. Dekstruloj regis la japanan postmilitan politikon kaj ili deziris, ke japanoj denove estimu la imperiestrecon. Fine ili sukcese igis la tagon de Ĵinmu la tago de la fondiĝo de Japanio.

Reakiri la koron

Nun la 11an de februaro okazas kulture kontraŭaj eventoj. Maldekstruloj en diversaj urboj organizas malgrandajn kunvenojn kontraŭ la tago: ili preferas pacon, ne naciismon. Dekstruloj festas kun ŝintoismaj organizaĵoj: en Tokio pasintjare partoprenis feston 1500 membroj de la reganta politika partio, kies ĝenerala sekretario deziris, ke oni „reakiru la japanan koron”.

Tamen ordinaraĵoj homoj indiferentas pri tiuj ĉi eventoj. Ili ĝuas simple la fe-

cion. Kiam la nuna ĉefministro Koizumi komencis regi, li sinsekve adoptis militismajn politikojn, ekzemple sendante japanajn soldatojn al Irako kaj torde interpretante la japanan konstitucion. Pro tio por maldekstruloj kaj demokratoj gravas kontraŭi la nacian tagon sed ĝenerale ili en Japanio estas tro okupataj, tro lacaj kaj tro malfortaj vid-alvide al dekstriĝanta tajdo.

Ne-kristanoj

Tri tagojn post la nacia tago festiĝas Sankta Valentino, la 14an de februaro. Interese, ke oni festas ĉi tiun tagon en lando konsistanta plejparte el nekristanoj. Sed antaŭ 30 jaroj japana ĉokolado-kompanio komencis reklami la tagon de Sankta Valentino kiel la tagon, kiam virinoj povas amkonfesi al viroj kaj donaci ĉokoladon al sia amato.

La reklamo kaj la tago populariĝis, ĉar tiamaj japanaj virinoj estis tiel modestaj, ke ili ne kuraĝis konfesi amon al viro. Tamen kiamaniere donaci estis problemo. Se virino donacus ĉokoladon al viro ekzemple en sia oficejo, ĉiuj scius ŝian sekreton. Por kaŝe amdonaci aŭ amkonfesi, ŝi distribuis al ĉiuj kolegoj malmultekostajn ĉokoladojn, inter kiuj ŝi aldonis luksan ĉokoladon al la amato.

Grandaj profitoj

Multaj virinoj same faris, kaj la tago fariĝis tre agrabla ne nur por la celataj viroj sed ankaŭ por multaj aliaj. Poste ne nur fraŭlinoj sed ankaŭ aĝaj virinoj donacis ĉokoladojn, kaj la tago ekli-

veris grandajn profitojn al la ĉokolado-kompanioj. Ili povas gajni trionon de la dumjara profito nur en la tago de Sankta Valentino.



Tamen nenio eternas. Kiam la japana ekonomio ekvelkis kaj oftigiĝis maldungoj, en oficejoj ekregis etoso neamika. Rezulte oni malpli donacis ĉokoladon: krome intertempe japanaj virinoj kuraĝis amkonfesi sen ĉokolado. Sed daŭre importata estas belga ĉokolado, por tiuj, kiuj volas donaci; kaj aktuale furoras „altklasa kaj japaneca” ĉokolado kun aromo de verda teo.

HORI Jasuo



KOMENTARIO

Kie kalumnioj skuas la animon

Proteste kontraŭ bridado de libera esprimado en Kroatio, Zlatko Tišljari rifuzas plu artikoli pri tiu ĉi lando. Siajn motivojn li sube klarigas.

Pasintjare en novembro zagreba tribunalo kondamnis kroatan intelektulon kaj multjaran prezidanton de la kroata PEN-klubo, Predrag Matvejević, je kvinmonata malliberiĝo pro kalumnio. Profesoro Matvejević akuzis bosnia verkisto, kiu en la kroata gazetararo dissemis malverojn pri bosniaj intelektuloj. Matvejević menciis lin en artikolo titolita „Niaj taliboj”.

La kroata leĝo pri informiloj permesas akuzojn pro kalumnio. Plej ofte la akuzantoj estas politikistoj, advokatoj kaj subtenantoj de la nuna politiko. Rezulte, en la nova kroata ŝtato, gazetoj kaj ĵurnalistoj ĝis nun estas punitaj je pli ol 1,5 milionoj da eŭroj. Ekzemple, al unusola homo la semajnevuo *Federal Tribune* devis pagi pro unu artikolo 30 000 eŭrojn. Pro aliaj tiaj kondamnoj kaj la sekva financa ŝarĝo la revuo nun aperas laŭ relative malmultekosta nigra-blanka formato.

Pli granda malbono

Sed ŝajne venos eĉ pli granda malbono. Nova leĝo ebligas al tiuj, kiuj per artikolo sentas siajn honoron aŭ reputacion atakitaj, postuli tribunalan repagon de damaĝo sen prezenti pruvojn pri t.n. animskuo. Krome, la interezoj pri la sumo pagota de la „kalumniinto” komenciĝas, kiam aperis la ofenda teksto kaj ne kiam verdiktis la tribunalo.

Tial gazetoj aŭ unuopaj verkistoj povos esti materie detruitaj pro iu ajn kritiko. Tio kaŭzos verŝajne memcenzuron kaj praktike neniigos liberan pensfluan kaj la eblon kritiki politikistojn, koruptulojn kaj krimulojn.

Kiom politikistoj, ligitaj al juristoj kaj juĝistaro, agas por silentigi kritikon, montras la plej nova kazo. Kroato akuzis la kroatan filozofon Milan Kangrga pri animskuo, ĉar la filozofo en sia libro skribis, ke „kroatoj estas pli malsaĝaj ol bestoj”. Kangrga diris, ke kolombo konas siajn interesojn, sed male kroatoj, kiuj voĉdonis por partio, kiu dum 10 jaroj detruis la ekonomion de la lando.

La akuzinto ofendiĝis kaj ĉefoj ĉe la tribunalo rapidigis la proceson kontraŭ la filozofo malgraŭ tio, ke la akuzo estas kontraŭleĝa. Oni ne povas akuzi iun kiel kroaton (apartenanton al nacio) sed nur kiel civitanon.

Zlatko TIŠLJAR

Vilniuso, la ĉefurbo de Litovio, estas kun la aŭstra urbo Linz nomumita ĉefurbo de eŭropa kulturo en la jaro 2009. Tiel Vilniuso fariĝas la unua urbo el la postkomunistaj ŝtatoj kaj el la novaj anoj de Eŭropa Unio, kiu ricevis ĉi tiun honoron. Antaŭ 2009 estos renkonstruitaj ne nur muzeoj, vojoj kaj la flughaveno, sed ankaŭ la palaco de la regnestroj. La kulturo-jaro koincidas kun la miljariĝo de la unua mencio en malnovaj kronikoj de la nomo Litovio.

LAST



AŬSTRIO

Ne tiom rapide, sinjoro!

Kontrolo de rapideco en aŭstra aŭtoŝoseo

Sur aŭstra aŭtoŝoseo oni rajtas veturi maksimume 130 km hore. Tio ne sufiĉas al la aŭstra vicĉefministro Hubert Gorbach [gorbaĥ]. Li volas permesi „rapidecon 160” sur difinitaj vojoj. Tuj sekvis protestoj: Tro da bruoj! Tro da emisioj!

Malŝparo de energio! Pli da akcidentoj!

La politikisto embarasiĝis. En kiu federacia lando li trovas aŭtoŝoseon por testi la projekton? Krome la afero ne valoras la penon. Se oni veturas 20 km je 130 km hore, oni bezonas

9 minutojn kaj 14 sekundojn. Se oni veturas la saman distancon je 160 km hore, la veturo daŭras 7 minutojn 30 sekundojn. Oni ŝparas nur unu minuto kaj 44 sekundojn. Sed la mov-energio plialtiĝas je 51 % kaj, sekve, plimultiĝas la akcidentoj.

Walter KLAG



Ju pli rapide, des pli da akcidentoj: ŝajne tion la aŭstra vicĉefministro Hubert Gorbach ankoraŭ ne komprenas.



DEMOKRATIA RESPUBLIKO KONGO

Privatiĝo de la publika transporto



Antaŭ dek jaroj la Demokratia Respubliko Kongo (DRK) havis tri entreprenojn de publika transporto en grandaj urboj. Ĉiuj bankrotis. Pro la politika krizo la registaro ne estis kapabla krei alian entreprenon. Tiu situacio kaŭzas ekonomiajn malfacilaĵojn.

En la grandaj urboj la transporto estas efektivigita de veturiloj de privatuloj. Tiuj ricevas ilin de siaj parencoj elmigrintaj, precipe el Eŭropo. Estas veturiloj, kiujn la okcidentanoj deklaras neuzablaj aŭ kiujn ili ne plu ŝatas uzi. Ili estas aĉetitaj malmultekostaj. En 1997, kiam Laurent Kabila iĝis la prezidanto de DRK,

li liberigis la importon de tiaj veturiloj kaj la dogano je ili estas malalta.

La ĉefurbo Kinŝaso havas preskaŭ sep milionojn da loĝantoj, kaj la transporto estas malfacila, precipe matene kaj vespere. Matene la plej multaj laboristoj konverĝas al la urbocentro, kaj vespere ili revenas. Laŭ la belgaj planintoj de la urbo la grandaj

entreprenoj kaj vendejoj estas en la centro, kaj de post la sendependiĝo nenio ŝanĝiĝis. La laboristoj, kies entreprenoj estas rigoraj pri akurateco, eliras siajn domojn je la kvara matene. En Kinŝaso, por uzi taksion aŭ alian transportilon, necesas batali, ĉar multaj atendas.

La kondukistoj de tiaj veturiloj renkontas multajn obstaklojn: la malbonan staton de vojoj, la policistojn, kiuj postulas servomonon anstataŭ respektigi la leĝojn, la armeanojn kaj la policistojn, kiuj senpage veturas kaj kelkfoje amase eniras, la trafikobstrukcojn, la petrolan krizon.

Por redukti la problemojn de la transportistoj, la registaro decidis, ke unu litro da benzino kostas malpli ol unu dolaro. Ankaŭ veturbileto malmulte kostu. Malgraŭ tio, la transporta situacio estas tre malfacila: anstataŭ kvin pasaĝeroj troviĝas sep en unu veturilo; la sidejoj en grandaj busoj estis forigitaj por meti benkojn por kvin aŭ ses pasaĝeroj. La registaro promesis la fondon de nova entrepreno.

Serge ZANDANDU NTOMONO ZOLA



Rizo: senelira problemo



Malagasoj kutimas sin nutri per tri rizpladoj ĉiutage. Tial je ĉiu kostaltiĝo de tiu varo la registaro timas popolan reagon.

Kvankam 80 % de la loĝantaro konsistas el kamparanoj, kiuj mem estas rizproduktantoj, la rikolto tute ne sufiĉas por nutri 17 milionojn da homoj. Ĉiujare oni devas importi pli ol 200 000 tunojn da rizo. Kulpas la arkaika kultivmetodo, kies ĉefa grundplugilo estas ŝpato. Plie, la kultivado ekstreme dependas de la pluvabundeco, kiu ne ĉiam favoras la kamparanojn. Tial unu hektaro da rizkampo provizas al ili ne pli ol du tunojn. Aliaj problemoj, kiel malfacila transporto, manko de sekureco kampara kaj analfabetismo, pezegas sur la situacio ekonomia de la malagasa kamparo.

Ekde novembro 2004 videblis senĉesa prezaltiĝo de la blanka rizo, kiu kulminis ĉe 8000 malagasaj frankoj (MGF, 1 eŭro = 12 000 MGF; averaĝa

salajro estas 10 eŭroj monate) por kilogramo. Tio daŭris ĝis la nova rikolto en majo de la nuna jaro. La kialo estas, ke, unuflanke, rizkolektantoj spekulcele retenis siajn stokojn. Aliflanke, ne tre granda estis la produktaĵo pro inundoj, kaŭzita de du sinsekvaj ciklonoj. Malgraŭ averto de profesiuloj pri eventuala krizo, la aŭtoritatoj ne malhelpis ĝin. Ne troveblis rizo en la vendejoj, kaj ĉiuj aĉetis maniokon kaj maizon. Bedaŭrinde ankaŭ tiuj surgoj malaperis post kelkaj tagoj.

Plia malbonaĵo estis, ke, intertempe, la rizkurzo en la internacia merkato plialtiĝis, ĉar ne sufiĉis la propono, dum Ĉinio pligrandigis sian rizimporton. La malagasa registaro malfacile trovis ŝipon por transporti rizon al Madagaskaro. Malmultiĝis la provizado, kaj nur kelkaj urboj profitis el tiu malmultekos-

ta rizo, vendata kontraŭ 3500 MGF por kvietigi, se ne la malsaton, almenaŭ la koleron de la popolo. Plimulto de tiu rizo venis el Barato. Ĝi estis la plej malbonkvalita, ĉar iuj konsumantoj, manĝinte ĝin, plendis pri jukado. Aliaj kvantoj venis el Pakistano kaj Ĉinio.

Ne eblas al la „Granda Insulo” tuj solvi la menciitajn problemojn, kaj ripetiĝo de la sama situacio estas tute probabla. Nun kilogramo da loka rizo jam kostas 5000 MGF, tamen normala prezo dum la nuna rikolta periodo averaĝus 2500 ĝis 3500 MGF. La registaro ordonis al ĉiuj regionestroj regi la eliron de rizo el sia regiono, kio denove altigas la ŝancon de la koruptemaj spekulantoj.

Kelkaj politikistoj, subtenantoj de la nuna registaro, instigas la popolon ŝanĝi la ĉefan manĝaĵon, propono ne tiom serioza, se konsideri la fakton, ke ĉi tie rizo estas ne nur nutraĵo, sed ankaŭ grava kulturelemento en la vivo de la malagaso.

FIDILALAO Henriel

Reviviĝo de mortinta lingvo



Nia hejma lingvo estas la gaela, lingvo de la kelta familio, parolata de etna malplimulto ĉe la ekstremaĵoj de okcidenta Eŭropo. Ofte ŝajnas al ni, ke ni estas parto de la lastaj supervivantoj de ŝrumpanta kulturo. Tamen, kelkfoje ni kuraĝigas nin per la penso, ke pli kaj pli da personoj komencas rekoni la valoron de siaj etnaj radikoj kaj lingvoj.

Krom la diversaj dialektoj de la gaela, estas tri similaj, samdevenaj, sed iom malsamaj variantoj de la lingvo, nome: la irlanda, la skota kaj la manksa. La lasta estas la indiĝena lingvo de la Manks-Insulo, kiu situas en Irlanda Maro, inter Irlando kaj Anglio. Ĝi ne estas oficiale regiono de Anglio, sed dependa teritorio de la brita krono kun sufiĉe alta grado de aŭtonomio. Ĝi havas propran registaron, la duĉambran tiel nomatan *Tynwald*, kiu ankoraŭ uzas la manksgaelan kiel ceremonian, kvankam ne laboran, lingvon. Ĝenerale, leĝoj faritaj de la brita parlamento en Londono ne validas sur la

insulo. La Manksa Insulo eligas siajn proprajn monbiletojn kaj poŝtmarkojn. La areo de la insulo estas 572 kvadratkilometroj, kaj en la jaro 2000 la loĝantaro nombris 76 200 personojn.

Malkiel la lingva situacio en Irlando kaj Skotlando, kie la gaela estas ankoraŭ vivanta, kvankam ne la plej parolata lingvo, oni kutime rigardas la manksan kiel mortintan. En la jaro 1800, naŭ dekonoj de la loĝantoj estis gaellingvanoj, sed en 1974 restis nur unu denaska flua parolanto, nome Ned Maddrell [madrel], kiu tiam estis 98-jara. Éamonn [ejmon] de Valera, prezidanto de Irlando, vizitis tiun lastan mankslingvanon, kiam Ned estis jam tre maljuna, kaj li miris, ke tiom mal multe da insulanoj tiam interesiĝis pri sia propra lingvo kaj lasas ĝin morti.

Nun vizitantoj al la Manksa Insulo konstatas ion vere eksterordinaran. En 2001 deklaris 1689 insulanoj, ke ili estas parolantoj de la lingvo. Oni demandas sin, kio okazis por kaŭzi tian ŝanĝon? Konfesendas, ke tiu nombro

estas malgranda kompare kun la tuta loĝantaro de la insulo, sed sufiĉe multaj de la loĝantoj ne estas indiĝenaj insulanoj, sed fremduloj el Anglio aŭ aliaj regionoj.

Fakte, eĉ post la morto de Ned Maddrell, la manksgaela ne estis tute forgesita. Dum lia vivo, oni persvadis lin surbendigi paroladojn en la manksa, kaj oni uzis tiujn registraĵojn por relerni la lingvon. Plie, diversaj manksaj vortoj kaj frazoj estis ankoraŭ uzataj de la insulanoj. Ĝi daŭris kiel ceremonia lingvo de la parlamento. Literaturo en la lingvo ne abundis, sed estis manksa traduko de la Biblio kaj kelkaj aliaj tekstoj kaj libroj. Lastatempe aperis vortaro, lernolibroj kaj aliaj publikigaĵoj. Do eblis „rekonstrui” kaj reenkonduki la lingvon en sufiĉe aŭtenta formo.

Pro instigo de lingvo-entuziasmuloj oni fondis antaŭlernejojn, kie malgrandaj infanoj lernis la lingvon. Poste, la registaro demandis al gepatroj, ĉu ili volis, ke la gaela estu instruita en la lernejoj. La respondo surprizis la aŭtoritatojn. El la gepatroj de la 3500 elementaj lernejoj, 1000 petis, ke la lingvo iĝu lerneja fako.

Unue estis la Manksa Hereda Fondaĵo, kiu pagis la koston de instruado, sed poste la registaro dungis kvin instruistojn por vojaĝi inter la lernejoj, instruante la lingvon. En la jaro 2003 malfermiĝis Gaela Elementa Lernejo en urbo Keeil Eoin. Ĝi havas tri instruistojn, kaj la nombro de la lernejoj kreskas.

Finfine la insulanoj rekonas la valoron de sia lingvo, kiel simbolo kaj pruvo, ke la manksa popolo estas aparta komunumo kun apartaj valoroj kaj kulturo, pri kiuj ili fieras.

Kvankam gaelparolantoj el Skotlando kaj Irlando povas sen granda malfacilo kompreni multon, kiun oni



Mapo de la Manks-Insulo.

Flago de la Manks-Insulo.

diras en la manksa, povas okazi miskomprenoj. Iu skota vizitanto al la lernejo en Keeil Eoin prezentis sian akompananton kiel „mian amikon Phil”. La tuta klaso eksplodis de rido, ĉar la skotgaela vorto *caraid* sonas kiel la manksa *carradje*, kiu signifas „karoto”. Aliflanke, vizitantoj eble ridetos, kiam ili konstatas, ke la manksa vorto por banano signifas „flava serpo”.

Bedaŭrinde la literumado uzata por skribi la manksgaelan estas malsama de la ortografioj uzataj en Irlando kaj Skotlando, kiuj unu la alian similas,

kvankam ne tute samas. Ĝi estis inventita de episkopo, kiu antaŭ tri jarcentoj tradukis la Biblion en la manksan, kaj ĝi baziĝas sur la mallogika angla skrib-sistemo, eble kun iom da influo el la kimra. Do gaellingvanoj el aliaj regionoj apenaŭ povas legi la manksan, eĉ se ili komprenas la parolatan lingvon.

Tia revivigo de mortinta lingvo ne estas unika. Alia ekzemplo troviĝas en Kornvalo, sud-okcidenta provinco de Britio, kie la lastaj parolanto de loka kelta lingvo mortis ĉirkaŭ la jaro 1800. Nevo de mia edzino tie loĝanta infor-

mas nin, ke malgranda sed signifa kaj kreskanta nombro da kornvalanoj lernas kaj nun uzas la kornvalan kiel familian lingvon. Pro tio refoje ekzistas areto da „denaskaj parolantoj” de la kornvala. Tiu renaskiĝo estas helpata de la fakto, ke la samdevena kaj simila kimra estas ankoraŭ vivanta lingvo.

Evidente, ne ĉiuj eŭropanoj konsentas pri la adopto de la angla kiel ununura aŭ precipa interkomunikilo de la kontinento.

Garbhan MacAoidh



Ruzo en rifuzo

Al la serio *Oriente-Okcidento* de UEA aldoniĝas ĉi tiu bele bindita kaj eldonita libro. La jam abunde tradukita verko aperas nun komplete en Esperanto. Hašek mem travivis la unuan mondmiliton, en kiu mortis 15 milionoj da personoj, inkluzive de miliono da soldatoj el la aŭstrahungara armeo. Lia reago estis ĉi tiu libro, verkita en 1921-1922, sed li mortis en 1923, fininte nur kvar el la ses planitaj partoj.

La heroo, kvankam laŭte proklaminta deziron lojale batali por la imperi-

estro, renkontas serion da malliberejoj, malsanulejoj kaj internigejoj, vidas homojn, kiuj ne povas aŭ ne volas batali, kaj diversajn absurdajn vizaĝojn de la milita maŝinaro kaj devas iel defendi sian identecon. La verko tiom penetris en la ĉeĥan konscion, ke ekzistas la verbo *ŝvejkovaĵo* kun la signifo „per ruzo travivi”. Kvankam plejparte rakonta kaj intim-scena, fojfoje la verko levas sin al pli alta rigardo, kiel fine de unu el la komencaj ĉapitroj: „Kaj ie en la foraj malproksimoj de la historio, ŝvebas al Eŭropo la fakto, ke la morgaŭo detruos ankaŭ la planojn de la nuntempo.”

Hašek pioniris novan verkstilon, analogan al tiu de la tiutempaj dadaismaj pentristoj. Luj opinias, ke tiu rekta, senornama stilo estis komenco de tradicio, sekvata poste de Hemingway, Fitzgerald, Faulkner kaj aliaj. Asertebblas, ke ĉi tiu estas pionira kontraŭ-milita romano. La aŭtoro de la difina tiuspeca romano pri la dua mondmilito Joseph [Jozef] Heller mem legis la libron *Ŝvejk* kaj

konfesis, ke sen tiu sperto lia romano *Kaptilo 22* neniam estus verkita.

Mi ne povas kompari la tradukon kun la ĉeĥa originalo, sed ĝi bone legiĝas kaj klare transdonas sentojn de ironio kaj satiro. Ĝi rajtas teni sian kapon alte, kompare kun fragmentoj el diversaj tradukoj al la angla. Gratas nur la kelkfoje ripetita „ke mi igos vin malliberigi” – ĉu eraro, ĉu klopodo redoni ĉeĥan misparolturnon?

La reagoj de *Ŝvejk* ridigas pro la ŝajna manko de logika ligo inter burokrataj demandoj kaj liaj respondoj. Mezurilo de traduk-kvalito estas, kiom traduko lasas al vi konkludi, ke *Ŝvejk* estas efektive stulta aŭ ke li ruze ŝajnigas/uzas tiun stultecon kiel traviv-teknikon. La esperanta traduko konvene starigas la demandon, sed lasas ĝin malferma. Ankoraŭ plia literatura klasikaĵo nun havebla nialingve.

Stefan MACGILL

Jaroslav Hašek: *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito*. Trad. Vladimír Váňa. Eld. Kava-Pech, Dobřichovice, 2004. 712 paĝoj. Firme bindita. Ilus. Josef Lada (nepo de la samnoma origina ilustristo). ISBN: 80-85853-76-0.

Prezo ĉe www.retbutiko.net: 39,90 eŭroj + afranko.

OSIEK PREMIO 2005

En 2005 la Osiek-anoj proponis 26 verkojn premiindajn; ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de *La Gazeto*. La 15an de julio 2005, dum la IEK en Rafina, Grekio, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Christian DECLERCK



MEGUMI SACHS-KOMAMURA

pro

“Tarokoj kaj epokoj”

Gratulon!

La premio, 600 €, rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verko ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro

informoj: La Gazeto 55210 Creuë Francio <http://osiek.org>

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,



Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Tif. + 32 3 234 34 00; tlk. + 32 3 233 54 33;

rete: retbutiko@fel.esperanto.be;

skajpe: fel-monato

aŭ per www.retbutiko.net.

Idealismaj rebriletoj malantaŭ la skeptika fasado

La nova libro de Stefan Maul ne estas membiografio – almenaŭ tion li mem asertas. Laŭ li, temas nur pri kolekto de spertoj kaj faktoj, kiuj ŝajnis al li gravaj por klarigi, kial li „estas kaj restas konvinkita adepto de l' ideo de L. L. Zamenhof”. Feliĉe por la leganto, Stefan Maul tre vaste interpretas tiun sian elirpunkton. Kaj same feliĉe por la leganto, ne temas pri ia rigardo al la mondo tra verdaj okulvitroj, sed tre realisma kaj kapta rakonto pri la vera vivo.

En unu-du lokoj la aŭtoro iom neatendite mencias ian miraklan potencon pri interkultura kompreno, kiun li atribuas al esperantistoj: „... vera dialogo inter kulturoj ne facilas sen komuna bazo, kiun provizas Esperanto kaj la ideoj ligitaj al ĝi”, li skribas sur paĝo 253, kaj daŭrigas pri esperantistoj aŭtomate „toleremaj, akceptemaj, komprenemaj”. Por multaj esperantistoj eble temas pri konstato de evidentaĵo, sed en la verko de Stefan Maul ĝi surprizas, ĉar ĝenerale la libro estas verkita en la maniero de bona ĵurnalisma raportaĵo: ĝi ĉefe registras kaj konstatas faktojn, iom ankaŭ la sintenon de la protagonisto al la okazaĵoj, sed permesas al la leganto mem pensi kaj fari konkludojn.

Tiasence la verko de Stefan Maul iom memorigas pri alia membiografia libro de germana ĵurnalisto-esperantisto, *Ĉiu ĉiun ...* de Teo Jung. En la vivo de la fondinto de *Heroldo Esperanto* kompreneble havis eĉ pli gravan rolon ol en la vivo de la fondinto de *Monato*, ĉar Teo Jung fakte dum multaj jaroj vivtenis sin per sia esperanta laboro, dum Stefan Maul neniam povis realigi sian projekton de *Semajno*, esperantlingva novaj-magazino kun eldonkvanto de dek mil ekzempleroj.



Jam antaŭ la komenco de la dua mondmilito Teo Jung estis devigita fuĝi el Germanio por eviti persekutojn fare de la nazioj – kaj fine de la sama milito la familio de Stefan Maul estis devigita fuĝi el Kroatio kune kun la retiriĝanta germana armeo. Stefan Maul tiam estis senkulpa infano, kaj ankaŭ liaj familianoj pri nenio kulpis – pri nenio, krom tio ke ili estis germanoj, de pluraj generacioj loĝintaj en Kroatio.

La plej personaj partoj de la libro temas pri la infanaĝo kaj lernejaraj jaroj de Stefan Maul. Li per malmultaj vortoj, sed kortuŝe rakontas pri la sento de fremdeco en la nova lando, Germanio, pri la rezervema sinteno de la lokanoj al la rifuĝintoj, pri la ekonomiaj kaj familiaj problemoj de la gepatroj.

Esperanto iom post iom iĝas unu el la saviloj, kiuj liberigas la izoliĝeman junulon el la fermita cirklo – alia savilo, post senluziigaj spertoj en katolika pastra seminario, iĝas la profesia ĵurnalista laboro, unue en paroĥa ĵurnalo kaj poste en aliaj gazetoj.

Pri sia plenkreska vivo Stefan Maul rakontas iom malpli persone ol pri la

infanaĝo, kaj li multe pli detale priskribas siajn profesiajn problemojn ol la familian vivon. Oni facile komprenas, ke li ne emas plene malfermi sian emocian vivon al eksteraj spektantoj, sed iom amuze iĝas, kiam li rezonas pri sia bezono edziĝi, menciante, ke li ne kapablis mem lavi kaj gladi siajn ĉemizojn (p. 145). Inter la linioj oni tamen klare sentas la gravecon de la familia vivo al la aŭtoro.

La verko donas multajn interesajn faktojn pri evoluoj en la Esperantomovado kaj en la esperanta gazetara vivo dum la lastaj jardekoj, sed la ĉefa saldo de la legado, tamen, estas persona konatiĝo kun Stefan Maul. Lian sintenon al la Esperantomovado, laŭ li mem, karakterizas la profesia skeptiko de ĵurnalisto. Eble jes, sed foje malantaŭ la skeptika fasado videblas idealismaj rebriletoj.

Kalle KNIVILÄ

Stefan Maul: *El verva vivo ĵurnalista*. Eld. FEL, Antverpeno, 2005. 269 paĝoj. ISBN 90 770661 87.

Prezo ĉe FEL: 20,00 eŭroj + afranko


Pri kutimoj kaj kalsonoj

Unue mi deziras aserti, ke ĉio en ĉi tiu kontribuajeto estas vera kaj fakte okazis.

Ekde sufiĉe longe ni – t.e. mia kara edzino Hortensia kaj mi – loĝas en Irlando, la tiel nomata Verda (aŭ Smeralda) Insulo. Ĝia verda koloro devenas de la ofta pluvo, kiu ankaŭ influas la karakteron de ĝia loĝantaro. Finfine, samkiel kreskaĵoj, homoj, kiuj konstante akvumiĝas, povas esti nek sekaj nek sterilaj.

Unu el la ĝojoj de nia vivo en Irlando estas renkontiĝo kun pli kaj pli da specimenoj de *homo hibernica*, kaj precipe kun la ina varianto de tiu specio. Ĉiu estas unika, kaj kelkaj estas aparte interesaj. Ĝenerale ili agas kaj pensas kiel aliaj membroj de la raso *homo sapiens*, sed multe pli „irlandece”. (Iliaj najbaroj kaj iamaj – sed ne plu – malamikoj en Anglio tuj komprenos, kion signifas ĉi tiu esprimo. Esence, ĝi celas, ke la irlandanoj iom malsimilas la anglojn kaj aliajn fremdulojn.)

Mi donu al vi kelkajn ekzemplojn. Iun tagon Hortensia renkontis sur la ĉefstrato en nia kampara urbeto mezaĝan konatinon, kiu portis bluan robon. Mia edzino gratulas ŝin pro la bela koloro de ŝia vestaĵo. „Ho jes,” ŝi diris, „mi havas apartan devotecon al Nia Damo*.” Honore al ŝi mi portas blujajn vestaĵojn.”



Nia amikino Nora estas tipa kaj simpatia irlandanino. Lutage ŝi vizitis nian domon por trinki teon kun Hortensio. Mia edzino rimarkis, ke iu subvestaĵo duonpendis el la poŝo de ŝia jaketo. „Ĉu vi ĉiam portas vian subvestojn en la poŝo?” demandis Hortensio. „Ne,” respondis Nora. „Mia mamzono estis tro strikta, do mi forigis ĝin”. Hortensio rakontis tiun okazaĵon al Brigito, alia pli juna amikino de ŝi, kiu diris, ke ŝi ofte same faras. Ĉu tio estas ĝenerala irlandana kutimo, ne estas klare. Ŝajnas, ke en aliaj landoj la virinoj ĉiam portas la subvestojn sur la korpo, sed evidente la irlandaninoj rigardas tion kiel tro rigoran.

Parolante pri la vestoj kaj subvestoj de la bela sekso, mi povus menciigi interesan reklamon, kiu aperis en irlandana televida revuo. Ĝi ofertis al la legantinoj modelon de longa kaj ampleksa nigra kalsono, nomita „La magia kalsono”. La reklamanta firmao pretendas, ke tiu mirinda subvesto efike maldikigos elstaran ventron. Dum telefona konversacio kun mia filo, kiu loĝas kun sia irlandana edzino en Skotlando, li diris, ke ŝi – lia kara duono – uzas similan subveston, sed ĝi estas surmerkata sub la marko „La betona kalsono”.

Parenteze, ie mi legis, ke iam en Usono vendiĝis tiel nomataj „atomaj botoj”, kiuj ne estis vere atomaj, sed laŭdire speciale komfortaj. Oni ne

aĉetis ilin jam faritajn. Ĉiu kliento devis meti siajn piedojn en ŝaŭme plastecan substancon, kiu tiam alprenis la formon de la piedo. Kiam la materialo estis seka, la botoj estis pretaj. Laŭraporte, la botoj estis senkompare komfortaj, sed samtempe senkompare malbelaj. Ili aspektis kiel piedoj de elefanto.

La hodiaŭa irlandanino tro ŝatas la lastajn modojn (ekzemple tiujn de la esperante nomita butikreto Vero Moda) por uzi atomajn botojn. Ŝi ne plu kutimas iri al la malmalmodernaj dancejoj (antaŭe nomitaj „balejoj de romantiko”), kie la partneroj ofte portis sterkoŝmiritajn kaŭĉukajn botojn. Nuntempe tio okazas nur en la okcidentirlanda urbeto Lisdoonvarna [lisdunvarna], kie ĉiujare estas „Edziĝfoiro”, ĉe kiu solecaj, sekse malsataj terkulturistoj povas renkontiĝi kun simile solecaj vidvinoj, maljunaj virgulinoj kaj ardaĵ sed ne plu junaj nimfomaniulinoj.

Ho ve, la irlandana socio tiom ŝanĝiĝis ... En nia kampara urbeto pli aŭdiĝas la pola kaj litova lingvo ol la irland-gaela, do certe ĉio iom post iom transformiĝas: mode, lingve, fizike, etne kaj kulinare. Espereble, ĝi ne tute malirlandiĝos. Pri kio ni tiam ridetos?

Albisturo KVINKE

*Nia Damo: la virgulino Maria.

La plej trompita homo

Laŭ informo en iu libro de la fama franca verkisto André Castelot, la plej trompita homo el la mondhistorio sendube estas la franca sinjoro Poinset. Li vere kredis kion ajn, kion oni kredis al li. Li vivis en la 18a jarcento, kaj li ofte estis la viktimo de amikoj, kiuj daŭre komunikis al li la plej nekredablajn aferojn.

Iun tagon oni informis lin, ke li estas elektita por instruadi al juna rusa princo

kaj ke li estas invitita tiucele al Sankt-Peterburgo. Sed kompreneble li devus tiucele unue lerni la rusan lingvon. „Amikoj” eĉ disponigis al li „instruiston” de tiu lingvo. Dum ses monatoj la kompatinda Poinset fervore studis „la rusan”. Nur kiam li sin pretigis por forvojaĝi en Rusion, liaj „amikoj” koniĝis al li, ke li ne estis dungita kaj ke li estas lerninta ... la bretonan.

Wim DE SMET

ANONCETOJ

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Facilaj donacoj por viaj korespondamikoj: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas libropunonoj en kiu ajn sumo, kiun oni oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL (www.retbutiko.net), kaj donacokuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Lode, okaze de la 35a datreveno de via naskiĝtago la 1-an de aprilo, mi tutkore gratulas kaj bondeziras al vi! Erwann.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

LA ONDO
DE ESPERANTO

Abonebla kontraŭ
27 EUR,
30 USD aŭ egalvaloro
ĉe UEA, FEL, ELNA,
UFE, EAB, SEF kaj
dudeko da aliaj landaj
perantoj.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- * Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- * Tra Esperantujo
- * Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikajoj
- * Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- * Historio kaj kulturo de Esperanto
- * Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- * Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- * Literatura suplemento jarfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6687

LA GAZETO

MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

gazeto@aol.com

<http://www.lagazeto.com>

Komencanto

komencanto@r66.ru

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj.
Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaĵoj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998 — Formato A4, 16 paĝoj

Abontarifo: **15 eŭroj**
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.

Abonu ĉe UEA
aŭ ĉe via landa peranto

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo: www.Komencanto.narod.ru

Poŝta adreso: KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg, 620041 Rusio

La retbutiko de FEL ekzistas 10 jarojn!

La 9an de februaro 2006 la Retbutiko de FEL ekzistas 10 jarojn!

Por tion festi, ni organizas grandan literaturan enketon kun premioj de **100, 50 kaj 25 eŭroj!**

Premioj: 100, 50 kaj 25 eŭroj!

Tri partoprenantoj, kiuj plej akurate respondis la konkurso-demandon, ricevos premion, ili rajtas aĉeti en la Retbutiko FEL-eldonaĵojn en la valoro de respektive 100, 50 kaj 25 eŭroj!

Kion fari?

1. Krozu antaŭ la 31a de marto 2006 al www.retbutiko.net kaj plenigu la enketilon pri viaj plej ŝatataj libroj.
2. Respondu la konkurso-demandon:

“Kiu estas la sumo (en eŭroj) de la prezoj de ĉiuj varoj en stoko en la Retbutiko je la 9a de februaro 2006, se de ĉiuj eroj nur unu ekzemplero estas kalkulita?”

Ĉiuj esperantistoj en la mondo estas invitataj partopreni la enketon, organizitan de la retbutiko de FEL (Flandra Esperanto-Ligo): www.retbutiko.net

Per la enketo, ni volas kompili liston de la plej popularaj libroj en Esperantujo nuntempe.

Reguloj: Ĉiu esperantisto rajtas sendi nur UNU enketilon. Ŝanĝoj en jam sendita enketilo NE estas akceptataj. Enketiloj kiuj alvenas post la 31a de marto NE validas.

Rezultoj: La tri gajnintoj ricevos personan mesaĝon. La rezulto de la granda enketo aperos en MONATO.